sub la suda kruco ★
marto 2013

ESPERANTO



ESPERANTO
SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 21 [1] numero 112 marto 2013

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktoroj: Kam Lee, Robert Budzul kaj David Ryan
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

P.O. Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEA | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk2@esperanto.org.au".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

1-a de junio 2013

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright @ 2013 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj

ISSN 1038-9380

Sur la kovrilo: Supre, Eric Wilson Abstraktaĵo – la kuireja fornelo 1943 Kolekto de la Artgalerio de NovSudKimrujo
Malsupre: Reklamo por la Universala Kongreso en Rejkjaviko, 2013

Sur la malantaŭa kovrilo: Eventoj dum la Brisbana Kongreso, 2012
Supre: Je la supro de Monto Gravatt, Brisbano
Malsupre: Vespermanĝo ĉe la Hotelo George Williams



Nekrologo de Donald Broadribb
Forpasis granda intelekto
4



Mia Unua Kiso
8



Intervjuo kun Jonathon Cooper
11



Zamenhof: kaj juda patrioto kaj internaciisto
15



Fama ido de Aŭstralio: Ŝtormido
18



Raporto de Brisbana Kongreso 2012
20

Stelsemantoj el la Ora Nordo
29



Rejkjavika Universala Kongeso 2013
30

Marto, du mil dekvi

NEKROLOGO:
D-RO DONALD BROADRIBB

3-8-1933 – 13-10-2012 **Vera Payne**

Resumo (iomete trancîta) de panegiro omaĝe al Don. Parolis lia edzino kaj filino, kaj mi mem pri lia Esperanta vivo.

Mi unuafoje renkontis Don kiam li lekciis pri psikologio ĉe la Universitato de Okcidenta Aŭstralio. Intervjuante lin por *La Nigra Cigno*, mi trovis afablan, konservative vestitan, trankvile parolantan (kun usona parolmaniero) maldikan viron. Kaj mi memoras, ke post kelkaj jaroj, ĉe la oficiala nomigo de *Esperanto Way*, Don sin montris tute ne konservative vestita, kaj kun brilkolora hararo! La maturaĝan Don kronis griza poneo-vosto kaj la ventro iomete dikiĝis ☺.


Naskita en Usono, Don venis al Aŭstralio en 1962. Kun magistra diplomo en teologio de seminario en Nov-Jorko kaj doktoriĝo de la Universitato de Melburno, kie li instruis dum 10 jaroj, li ankaŭ studis filozofion kaj lingvistikon en tiuj du landoj. Ekzemple, li gajnis magistran diplomon ankaŭ en la hispana. Krome, li studis psikoanalizon en Svislando kaj li diplomiĝis en analiza psikologio de la Instituto CG Jung en Zuriko. 13-jaraĝa li esperantistiĝis kaj, post kvar jaroj, aniĝis al UEA en 1950. Li rapide iĝis eminentulo de la internacia lingvo.

Li elstare redaktis diversajn revuojn: *Nord-Amerika Esperanto-Revuo, Kristana Bulteno, Biblia Revuo* (ĉirkaŭ kiu en 1967 li kunfondis *la Internacian Asocion de Bibliistoj kaj Orientalistoj), Esperanto sub la Suda Kruco,* kaj *La Nigra Cigno.* Li kunkompilis la *Terminaro de Bibliaj Studoj* en 1973. Ekde 2008, li eldonis 21 belajn kaj tre ŝatatajn ret-numerojn de *Mirmekobo,* en, sed ne pri, Esperanto. La lasta eldono, nur unu semajnon antaŭ lia morto, estis 48-paĝa.

Don ankaŭ estis mirinda tradukisto. El la antikva greka lingvo, kiun li flue parolis, en Esperanton venis *La Respubliko* de Platono (kiu gajnis por li la OSIEK-premion en 1995), kaj ankaŭ *Kratilo* de Platono. Li amis kaj esperantigis la serion



Bildo 1:
Donald Broadribb: aŭtoro, tradukisto kaj eksredaktisto de ESK



Bildo 2:
La traduko de Donald Broadribb de "La Respubliko" gajnis la OSIEK-premion en 1995. (OSIEK estas mallongiĝo de Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj). Platono verkis la originalan tekston en proksimume 380 AK.

Alico en Mirlando de Lewis Carroll, kiel ankaŭ la serion *Mirinda Sorĉisto de Oz* de L. Frank Baum. Aldone, li tradukis *1984* de George Orwell, plurajn *Mortmarajn Rulaĵajn* tekstojn el Qumran (Palestino), kaj eĉ *Eposoj en Antikva Ugarito* - kuneiforma lingvo en antikva Sirio; ĉu nenia fino de liaj talentoj? En la angla, li verkis *The Structure of Biblical Hebrew Poetry*, esotera eble por vi kaj certe por mi, sed ĉiutaga afero por Don. Ĝi estis la tezo por lia doktoriĝo en la Universitato de Melburno. Li estis dufoje membro de la Akademio de Esperanto (1972-81 kaj 1992-2001), fratulo de AEA (1996) kaj honora membro de UEA (1997).

Kaj Don brilis ne nur en Esperanto. Dum kelkaj jaroj li redaktis la oficialan bultenon de la Societo Jung en Perto, pri psikologio kaj psikoanalizo. Sur miaj bretoj troviĝas *The Mystical Chorus* pri Jung kaj la religia dimensio, *The Dream Story* pri sonĝado, kaj ankaŭ *Marcia*, fantazio kiun li verkis por sia filino, Chris. Ege feliĉigis min ke li finfine cedis al miaj instigoj verki aŭtobiografion; pasintan jaron li eldonis la kelkfoje korŝiran *Pebbles on my Road*. Kun sia fratino, Marilyn, kiu vivis kaj lekciis en Usono, li verkis adoltan idilion.


Don instruis plurfoje la plej altan nivelon en la Esperanto-somerkursaroj, precipe en Adelajdo. Krom esti tre kapabla instruisto, li ĉiam estis interesa kunparolanto. Mi provlegis diversajn redaktaĵojn liajn, kaj precipe ĝuis la sekvantajn e-poŝt-konversaciojn pri la verko-enhavo, kaj ankaŭ pri la vivo ĝenerale, kun ĝiaj sorto-ŝanĝoj.

Dum la lastaj 14 jaroj, Elizabeth (Liz) Christmas estis la amanta edzino kaj intelektula kunulino de Don, kies vivo ja estis plena je malfeliĉigaj batoj, inter kiuj la morto de pluraj amataj familianoj. Lia sanstato neniam estis fortika, kaj ĉiam Liz estis apud li, eĉ ĝis la fino. Don neniam estis plendemulo; ĉu en fizika aŭ mensa doloro, li simple sidis ĉe sia komputilo kaj laboris. Lia produktokvanto estis mirinda.

Ripozu en paco, Don. Vi vere estis vivanta internacia trezoro. Kiel skribis admiranta bloganto, vi aldonis multajn juvelojn al la trezorkesto de Esperanto-literaturo. Estis honoro vin koni; vi mankos al ni.



Bildo 3: Kovrilo de la e-gazeto "Mirmekobo". La besto, Mirmekobo angle nomiĝas "Numbat".



Bildo 4: "Pebbles on My Road" estas aŭtobiografio de Donald Broadribb, kiu skribis pri sia frua vivo en Usono dum la tempo de la depremo, la periodo de sia kariero kaj sia emerito.

Forpasis granda intelektulo

Trevor Steele

La 13-an de oktobro pasintjare forpasis Donald Broadribb, unu el la plej eminentaj intelektuloj de la tutmonda Esperanto-movado. Nur koncize listi la laborojn, kiujn Donald faris por Esperanto, kiel tradukanto, redaktanto, recenzanto, juĝanto de literaturaj konkursoj, kaj bibliografanto bezonus multajn centojn da vortoj (vidu la nekrologon en la revuo *Esperanto* de novembro 2012).

Unu el la ŝlosilfaktoj en la vivo de Don estis lia regado (almenaŭ lege kaj skribe) de multaj lingvoj, ĉefe antikvaj, speciale la greka kaj hebrea. Ekzemple, en 1967 li fondis la *Biblia Revuo* kaj iĝis ĝia ĉefredaktanto: tiu revuo havis prestiĝon ekster nia movado. Lia traduko de *La Respubliko* de Platono gajnis la OSIEK-premion de 1995.

Don estis plej konata en Aŭstralio kiel redaktanto. *La Nigra Cigno*, *Esperanto sub la Suda Kruco*, kaj laste lia altnivela reta revuo *Mirmekobo*, ĉiuj riĉiĝis ne nur de lia redaktado sed ankaŭ de liaj propraj kontribuoj, antaŭ ĉio recenzoj. Mi mem profitis de liaj recenzoj: se Don ne ŝatis iun parton de romano mia, mi sciis ke ĝi estas ree pripensenda.

Sed ŝajnas al mi ke lia plej ŝatata okupo estis tradukado. La nekrologo en *Esperanto* mencias liajn tradukojn el diversaj lingvoj sed mankas aludo al unu el la fortostreĉoj de Don, kiu iam, mi esperas, ricevos la agnoskon meritatan. Temis pri lia traduko de *Precious Bane* de Mary Webb verkita en la dialekto de Ŝropŝiro Don tre lerte evoluigis lingvaĵon por redoni la nenorman dialekton. La Esperanto-versio, nomata *Malbeno kara*, estas unuarigarde “stranga” sed rapide oni kutimiĝas kaj komprenas. Tamen, la verko ricevis tiom da negativaj recenzoj de homoj kiuj ne komprenis la celojn de la tradukinto ke Don reverkis ĝin en norma lingvaĵo. Mi esperas ke Don ne detruis la kritikitan verkon: iam ĝi helpos aliajn kiuj devas elpensi manieron redoni dialekton.

Don ricevis la plej altan honoron de kaj la Aŭstralia Esperanto-Asocio (fratuleco en 1996) kaj de la Universala Esperanto-Asocio (honora membreco en 1997).

Don havis viglan intelektan vivon ekster Esperantio. Antaŭ ol migri el Usono al Aŭstralio en 1974 li havis diversajn profesiojn (ofte kun ligo al eklezio), kaj li studis la psikoanalizon de Jung en Svislando Lia anglalingva libro pri interpretado de sonĝoj estas leginda (kvankam li diris al mi ke li scias ke neniu vere povas interpreti la sonĝojn de aliaj) Nekutima projekto estis la verko *Intertwined Lives*, kiun li kunverkis

kun sia fratino Marilyn Holly. Marilyn verkis unu ĉapitron kaj sendis al Don, kiu verkis la duan ĉapitron sen konsulti Marilyn, kiu devis daŭrigi la rakonton per ĉapitro 3 kaj sendi al Don, ke li verku la kvaran ĉapitron ktp. Tiu libro estas aĉetebla ĉe lulu.com.

Kaj alia surprizo: Don verkis aŭtobiografion kun la titolo *Pebbles On My Road* Estis multaj tragedioj kaj malfacilaĵoj en lia vivo kaj li honeste prezentas ilin.

Lasta rimarko: mi iam vizitis Don kiam li loĝis sola en la vilaĝo Beverley. Tie li vivis en tute intelekta sfero, uzante sian komputilon de mateno ĝis vespero, kaj neglektante manĝi aŭ ekzerci sian korpon. Eĉ ŝajnis ke estas al li egale se li baldaŭ mortos. Mi estas certa ke lia lasta edzino, Liz Christmas, plilongigis lian vivon je pluraj jaroj, kaj ni ĉiuj danku ŝin pro tio.



Bildo 5: "Rinkitinko en OZ" estas traduko de fablo, kiu estas verkita de L. Frank Baum kaj presita en 1916. Rinkitinko estas viro, kiu liberigis la popolon de la insulo de Pingaree el siaj invadantoj.

Bildo 6: Aprilon de 2008, Sandor Monastori (maldekstre) renkontis Donald Broadribb (dekstre) kaj Elizabeth Christmas (meze) en ĉina restoracio en la hejmurbo de Donald, York en Okcidenta Aŭstralio. Sandor iĝis redaktoro de ESK kaj diskutis taskojn pri kontrolado de ESK.



La Filmo “Mia Unua Kiso”: intervjuo kun Nicole Else

Kam Lee

1) Mi petas ke vi mallonge prezentu vin.

Mia nomo estas Nicole Else. Mi pasigis mian infanecon en Francio kaj translokiĝis al Aŭstralio en 1988. Ĉar miaj gepatroj, geavoj, kaj geonkloj estis esperantistoj mi eklernis Esperanton jam kiel 6-jarulo.

2) Dum la Brisbana kongreso fine de septembro ni spektis vian filmeton “Mia unua kiso”. Ĉu vi bonvole klarigos pri kio temas kaj ĉu vi mem verkis la rakonton?

La filmo estas 15-minuta, filmita dum Esperanto-somertendaro ĉe la centra marbordo norde de Sidnejo en januaro 2011. La aktoroj estis ĉiuj partoprenantoj en tiu somertendaro. Ne estis multe da tempo por filmi. Ĉio devis esti farita ene de kelkaj tagoj inter kursoj kaj aliaj aktivecoj de la renkontiĝo. Nur etaj partoj estis filmitaj antaŭe, tio estas kiam oni vidas Sidnejon kaj Manlion.

La filmo temas pri Stanislao, viro kiu memoras sian unuan kison kun junulino, Antonia. Stanislao deziras retrovi la junulinon, kiun li tiam kisis. Mi mem verkis la tekston, sed tamen mia teksto estas bazita sur rakonto kies titolo estas *Panjo kaj morto*. Tiu rakonto estis verkita originale en Esperanto de kroata esperantistino, Etel Zavadlav, kaj aperis en la revuo *Femina*. Do, mi kopiis plurajn ideojn el tiu rakonto, sed tamen sufiĉe multon ŝanĝis kaj ellasis grandajn partojn.



Bildo 1: Ĉe piknika tablo ĉe la marbordo kaj Stanislao (Rikardo) konversaciis kun sia frato (Kiah).



Bildo 2: Stanislao emocie memoradas pri renkontiĝo de Antonia, juna dancistino kaj la unua dolĉa kiso.

Bildo 3: Toni Gabrov (Teri) estas patro de Stanislao kaj nesukcese provis konvinki sian edzinon, Sinjorino Gabrov (Nicole), ke li ne estas ebriulo kaj televidila maniulo. Baldaŭ okazis kverelo.



Mi iom hazarde trovis la nomon de Etel sur la reto kaj deziris ricevi informojn de ŝi rilate al iu Esperanto-organizo. Tiam mi komencis korespondi kun ŝi kaj ŝi ofte sendis al mi mallongajn rakontojn kaj poemojn kiujn ŝi verkis. Ŝi havas originalan skribmanieron kiu plaĉas al mi. Ekzemple, kiam en la filmo la patro diras ke li meritas ricevi medalon, tio ja estis en la originala rakonto. Mi scivolemis kion Etel pensos pri tio kion mi faris per ŝia rakonto. Feliĉe ŝi ŝatis mian filmon. Spektu la filmeton ĉi tie: www.youtube.com/watch?v=TT12A-OIAuo.

Vi ankaŭ trovos sur Youtube du filmetojn kiuj montras ke la provoj filmi ne ĉiam tuj sukcesis!

3) Ĉu vi havas aliajn ŝatokupojn krom esti provleganto de la e-novaĵletero *Aŭstraliaj Esperantistoj*? (Parenteze, mi ĝuas legi tiun e-novaĵleteron kaj mi kuraĝigas legantojn sendi fotaĵojn kun iom da priskriba teksto al rspring@tpg.com.au.)


Krom fari filmetojn, mi ŝatas krei retejojn, ekzemple worldlanguage.info. Mi ankaŭ ŝatas traduki infanrakontojn. Ĝis nun mi tradukis 12 kunlabore kun ne-esperantista organizo BookBox. BookBox kreis la moviĝantajn bildojn kaj kunmetis la filmetojn. Dek rakontoj videblas sur Youtube, ekzemple *La unua puto* kiu jam estis spektita pli ol 10,000 fojojn.

Vidu www.youtube.com/watch?v=_fmqZmaojaA. Por nur $3 vi rajtas elŝuti rakonton ĉe www.bookbox.com

Mi interesiĝas ne nur pri Esperanto sed ankaŭ pri lingvoj ĝenerale, pri pli justa internacia komunikado kaj tial mi



Bildo 4: Toni drinkas kun amiko (Mark) en drinkejo. Espereble drinko de glaso da biero instigos ideojn por solvi la alkoholisman problemon, ĉu ne?



Bildo 5: Serĉo por la dancistino komenciĝas. Stanislao unue vizitas oficiston de operdomo (Alan) por informo. La oficisto mencias dancinstruiston.

Bildo 6: Stanislao iras al la domo de la dancinstruisto (Dimitri) kaj montras bildon de Antonia. Orfejo en Manlio estas menciita. Bonŝance, Stanislao havis 50 dolarojn en sia poŝo, ĉu ne?





Bildo 7: Renkonto de estro de la orfejo (Rainer) ĉe la orfejo. Bedaŭrinde, Stanislao ne sukcesis ricevi informon ĉar li estas nek parenco nek boparenco de Antonia.



Bildo 8: Policisto (Andrew) informas Sinjorinon Gabrov pri la morto de ŝia edzo pro koratako.




Bildo 9: Sinjorino Gabrov kun sia filo, Stanislao, diskutas pri la interreta novaĵo de la morto de Sinjoro Gabrov.

verkis libron. La libro celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn, sed mi pensas ke ankaŭ plenkreskuloj povas lerni ion el mia libro. La titolo estas *Foreign languages: what they don't often tell you*. Mi mem vendas la libron por $10 inkluzive de sendkostoj ene de Aŭstralio.



Bildo 10: Finfine rerenkontiĝo de Stanislao kaj Antonia (Jo), la dancistino. La rendevuo povis okazi ĉar Antonia hazarde vidis en la interretejo pri la morto de la patro de Stanislao. Feliĉa fino okazis. La fino!



Bildo 11: Antaŭkovrilo de la libro de "Foreign Languages: what they don't often tell you", verkita de Nicole Else

Intervjuo kun Jonathan Cooper

Kam Lee



Bildo 1: Jonathan Cooper

Jonathan Cooper studis art-edukadon ĉe la Universitato de Nov-Sud-Kimrio. Li laboras ĉe la Art-Galerio de Nov-Sud-Kimrio dum 30 jaroj kun multaj postenoj – inkluzive de ĉefo de edukaj programoj, retejestro kaj, nun, ĉefa kunordigisto de interretaj programoj – kaj li ofte prelegas pri arto kaj art-edukado.

Jonathan eklernis Esperanton kiel junulo. Li havis kelkajn okazojn dum la jaroj por kunmeti Esperanton kaj arton, ekzemple prelego ĉe la Galerio por grupo de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso en 1992, artikolo pri desegnado en la revuo *Monato* en 2001, kaj prelego pri la signifo kaj originoj de moderna arto ĉe la Internacia Kongresa Universitato (parto de la 97a UK) en Hanojo en aŭgusto 2012.

Li estas edziĝinta, kun tri plenaĝaj gefiloj kaj tri genepoj. Li estas membro de la Esperanto-Grupo de la Centra Marbordo, norde de Sidnejo, kie li loĝas.

1) Kiujn aŭstraliajn artistojn vi admiras?

Estas multaj, sed mi aparte admiras Charles Conder, (1868-1909) ĉefpentristo de la Heidelberg-Lernejo, kiu disputeble estas la fondinto de distinga aŭstralia tradicio de okcidenta arto.

David Davies, (1864-1939), alia pentristo, kiu arte estas influita kaj kontribuis al la Heidelberg-Lernejo.

Margaret Preston, (1875-1963) memorita pro siaj modernistaj pentraĵoj inter la dudekaj ĝis kvardekaj jaroj de la pasinta jarcento. Ankaŭ memorita pro la enkonduko de indiĝenaj temoj en nuntempan arton.

Grace Cossington Smith, (1892-1984) aŭstralia pentristino kaj pioniro de moderna pentrado en Aŭstralio kaj ĉefa influo por la enkonduko de postimpresionismo al Aŭstralio.

Rosalie Gascoigne (1917-1999) nov-zelanda-aŭstralia skulptistino.

John Henry Olsen, (1928 -) aŭstralia pentristo, kies ĉefa temo estas pejzaĝoj.

2) Kelkaj el viaj menciitaj artistoj vivis dum la dua duono de la dudeka jarcento. Ĉu vi konis kaj renkontis ilin?

Mi vidis Robert Klippel, Rosalie Gascoigne, kaj John Olsen vid-al-vide (dum publika evento), sed mi ne

parolis kun ili.

Kam: Robert Klippel (1920-2001) estas konstrukciisma skulptisto kaj instruisto. Ofte laŭ nuna artliteraturo, li estas konsiderata la plej bona aŭstralia skulptisto.

Proksimume antaŭ ok jaroj, mi vidis ekspozicion de la skulptaĵoj de Robert Klippel en la artgalerio en Federacia Placo en Melburno. Mi memoras ke la ekspozicio montris multajn malgrandajn multkolorajn abstraktajn skulptaĵojn, kiuj havis malpli ol dek centimetrojn.

3) Kiujn nov-zelandajn artistojn vi admiras?

Mi konfesas ke mi ne konas multajn, sed mi ja ŝatas la artaĵojn de Rita Angus kaj Colin McCahon.

4) Ĉu aŭstralia arto havas distingajn trajtojn?

Rigardante multajn aŭstraliajn artaĵojn, oni probable ne notas ilian 'aŭstraliecon', sed aŭstraliaj pejzaĝobildoj estas ĝenerale pli malfokusitaj kaj 'disarigitaj' ol la eŭropaj, kiuj ofte havas arbogrupojn kaj maldensejojn. Se vi interesiĝas, komparu la pentraĵojn de la franca Claude Lorrain kaj tiujn de la aŭstraliano John Glover, la brito David Hockney, kaj la aŭstraliano Fred Williams.

5) Kian arton vi plej multe ŝatas?

Tio estas malfacila demando ĉar estas tiom da tipoj de arto, kaj tiom da celoj por arto. Tamen, du el miaj plej ŝatataj estas WC Piguenit, Diluvo sur la Darling 1890 (1895), kaj Frederick Leighton, Cymon kaj Iphigenia (ĉ 1878). Mi ankaŭ tre ŝatas multajn pentraĵojn de Henri Matisse kaj Mark Rothko, kaj skulptaĵojn de Auguste Rodin.

6) Ĉu vi ŝatas modernan muzikon?

Mi dezirus diri, 'Mi ne scias multe pri moderna muziko sed mi scias kion mi ŝatas'. Same kiel pri arto, mi ŝatas muzikon, kiu movas min emocie. Mi tre ĝuas la muzikon de Erik Satie, Joni Mitchell, Geoffrey Gurrumul Yunupingu, kaj Massive Attack.

7) Mi konas la unuajn tri menciitajn nomojn (Erik Satie, Joni Mitchel kaj Geoffrey Gurrumul Yunupingu) kaj ilian muzikon mi ŝatas. Fakte, mi konis Geoffrey Gurrumul Yunupingu per lastatempa inspira filmdokumento farita de ABC.

Tamen mi ne konas "Massive Attack" kaj kiel vi ekkonis ilin kaj kiel vi priskribas ilian muzikon?

Jonathan sendis al mi e-ligon de Wikipedia pri la angla muzika grupo, kies ĉefaj muzikistoj estas Robert "3D" Del Naja kaj Grant "Daddy G" Marshall. Ili estas konsideritaj kiel la gepatroj de la ĝenro "trip hop".

http://en.wikipedia.org/wiki/Massive_Attack

http://www.youtube.com/watch?v=u7K72X4eo_s

Jonathan sendis al mi e-ligilon al vidsonbendo en Youtube de la kanto *Larmguto*, kiu estas en lia kantalbumo *Mezzanine*, prezentita en 1998. La kanto estis trankvila melodio kantita de virino (Elizabeth

Fraser) kaj la muzika akompano uzas malpezajn muziksintezatorojn, regulan pulson de tamburoj, iom da piano kaj kelkfojan aperon de la gitaro. La ĉefa vida objekto en la bendo estas nenaskita kantanta homa feto.

"Amasa atako" de sono de elektronikaj gitaroj, tamburoj, voĉaj kriegoj kaj tiel plu ne okazis en ĉi tiu kanto, sed eble en aliaj kantoj.

Eble mi sufiĉe deflankiĝas el la ĉefa temo.

8) Kiuj estas la ĉefaj diferencoj inter klasika kaj moderna arto?

Unue, moderna arto prezentas realecon kiel relativan (dependa de la vidpunkto de la artisto), ne absolutan. Due, la celo de moderna arto estas la kreado de memstaraj objektoj, ne de iluzioj. Tio estas la bazo de mia prelego en Hanojo.

9) Ĉu bonkvalito en arto ne estas tute subjektiva? Ĉu oni povas diri, "Tiu artaĵo estas bona," aŭ ĉu oni devus diri nur "Mi ŝatas ĝin"?

Estas frande konsideri arton kiel tute subjektivan, ĉar tiom da nuntempaj artistoj rompas la malnovajn regulojn de arto, ekzemple, de proporcio, perspektivo kaj farbtekniko. Tamen tio estas paŝo tro fora. Eble estas pli facile klarigi tion, kio faras artaĵon malbona. Unu grava celo de arto estas emocii nin. Sed se artaĵo faras tion tro evidenta, ni suspektas ruzon, kvazaŭ oni diras al ni, 'Tio estas trista; ploru!' La ebla efiko estas malpliigita.

10) Ĉu oni devas scii multe pri la socia kaj arta fono de artaĵo – kaj la persona vivo de la artisto kiu kreis ĝin – por vere aprezi ĝin?

Certe, scii iom da faktoj pri la artisto, kaj lia aŭ ŝia socia medio, povas helpi onin pli kompreni artaĵon, sed tio ne anstataŭas kontempladon de la artaĵo mem, prefere la reala artaĵo, ne reprodukto. Troa emfazo sur la eksteraj faktoj eĉ povas obstrukcii onian aprezon de la artaĵo. Estas multaj demandoj, kiujn oni povas fari por esplori artaĵon nekonatan. Ekzemple: Al kio viaj okuloj estas altiritaj unue? Kiaj estas la linioj, la formoj, la koloroj? Kiel ĝi komparas al aliaj artaĵoj el la samaj loko kaj tempo, eble montritaj en la sama ĉambro? Aliajn uzindajn demandojn vi povas trovi ĉe

Bildo 2: "Postmeztago, Bondi" (1915), Elioth Gruner (Nov-Zelando, Aŭstralio 1882–1939), Artgalerio de NSK



www.ipernity.com/blog/224665/429230.

Kam: Mi rigardis la retpaĝojn kaj rilatajn e-ligojn. Interesa estas la diskuto pri kiel ni tradicie rigardas bildojn. La prezentitaj temoj pri filozofaj ŝercoj estas ankaŭ diskutindaj.

11) Kio en via opinio estas la direkto de moderna arto?

Iuj diras ke la tempo de moderna arto pasis, ke ni jam vivis en la 'postmoderna' erao dum proksimume 40 jaroj. Postmodernismo estas ido de amaskomunikado – televido, reklamado kaj la Interreto – kaj estas ludema, ironia kaj iam moketa. Sed mi anticipas ke estas sufiĉe da spaco en arto por kaj moderna kaj postmoderna arto dum iom da venonta tempo.

12) Kio estas via plej ŝatata artgalerio?

(Kompreneble, mi devas elekti la Artgalerion de NovSud-Kimrujo, ĉar ĝi havas apartan lokon en mia koro.) Estas multaj gravaj artmuzeoj en la mondo, kiujn mi ankoraŭ ne vizitis, sed el tiuj, kiujn mi vizitis, miaj plej ŝatataj estas la Nacia Galerio en Londono, la Muzeo de Moderna Arto en Nov-Jorko, kaj la Art-Instituto de Ĉikago.

Bildo 3: "El Malproksima Lando" (1889), David Davies, Artgalerio de NSK

Ekstrakto de lia prelego Moderna Arto:

Kio ĝi estas? De kie ĝi venis?

(ŝanĝita iomete pro kopirajtaj artaĵoj)

Difino de stilo

Multaj homoj opinias ke la du celoj de 'reala' artisto estas: unue, figuri ion, kaj due, fari ion belan. Sed, kvankam artaĵoj eble estas figuraj kaj belaj, la kreado de arto estas pri io alia. Mi demonstru:

Imagu ke ni ĉiuj estas kune en art-muzeo kaj mi estas artisto (aŭ mi almenaŭ konsideras min tiel). Mi decidas krei artaĵon por la muzeo. Mi havas skatolon plenan de forĵetaĵoj. Mi renversas la skatolon kaj la forĵetaĵoj falas sur la plankon.

Nu, se ni forirus kaj postlasus la 'artaĵon' en la muzeo kaj revenus post unu tago, ĉu la artaĵo ankoraŭ estus tie ĉi? Ne? Kial ne? Kiu forprenus ĝin? Kiu havas la veran povon en la artmuzeo? Ĉu la direktoro? Ĉu la kuratoroj? Ne, la purigistoj! Estas ili, kiuj devos decidi ĉu la amaso da objektoj estas vere artaĵo aŭ nur forĵetaĵoj. Do, kiel la purigisto decidus? Kaj ĉu ni povus



certigi ke la ‘artaĵo’ estos tie ĉi morgaŭ? Kiel? Ĉu etikedo? Ĉu signo? Ĉu prez-signeto? Ĉu kadro?

Tiuj ĉi objektoj eble sufiĉus, sed ni verŝajne bezonas ion pli esencan, ion kio konvinkus purigiston (kaj aliajn) ke tio ĉi estas vera artaĵo, ne nur ke ni opinias ke ĝi estas tia.

Do, ni povus fari ion al la forĵetaĵaro mem, por ke ĝi aspektu pli ‘arta’ kaj intenca. Ni povus vicigi la objektojn. Ni povus elekti objektojn, kiuj havas similajn kolorojn.

Eble ni havas ideojn, sed kion iuj artistoj dirus al ni, se ili povus? David Davies eble dirus al ni, bazite sur sia pentraĵo, El fora lando (vidu bildon): “Emfazu horizontalojn kaj vertikalojn. Uzu plejparte neŭtralajn kolorojn (brunojn, grizojn, kremojn, nigron kaj blankon) kaj eble malgrandan akcenton de brila koloro, ekzemple oranĝa.”

Elioth Gruner estis fama pro siaj impresionismaj pejzaĝoj. Li eble dirus al ni, bazite sur sia malgranda pentraĵo de virino sur la plaĝo (vidu bildon): “Uzu atmosferon por malklarigi la bordojn inter objektoj, kaj malgrandigi la kolor-diferencojn.”

Eric Wilson estis raraĵo en aŭstralia arto: vera kubisto, kiel Picasso. Vidu lian pentraĵon. Kion li eble dirus al ni? “Uzu dispecigadon.” Alivorte, dispecigu la objektojn kaj muntu la pecojn en alian aranĝon.

Nu, ni povus demandi konsilon de iu ajn artisto. Ĉiu respondus al ni laŭ sia propra metodo por ŝanĝi kaoson en ordon, por ŝanĝi ŝancon en intencon. Kaj ĉiu metodo estas afero, kiun oni kutime nomas ‘stilo’.

Zamenhof: kaj juda patrioto kaj internaciisto

Trevor Steele

Ni memoras Ludovikon Lazaron Zamenhof (LLZ) kiel la kreinton de Esperanto, homon kiu ricevis multe da laŭdoj kaj preskaŭan adorkulton al la “Majstro”.

Sed la vivo de Zamenhof estis plena je konfliktoj, kiujn ni ne komprenus, se ni ne scius iom pri lia deveno.

LLZ estis judo aŭ, kiel la rusaj judoj preferas sin nomi, hebreo. Vivante en relative paca Aŭstralio, kie intergenta konflikto erupcias malofte kaj nur je la malsupro de la intelekta nivelo de la nacio, ni apenaŭ povas fari al ni bildon pri la situacio de judoj dum la lasta jarmilo en Eŭropo. Bialistoko, kie LLZ naskiĝis kaj kreskis, estis klara ekzemplo de loko, kie regis intergenta konflikto: poloj kontraŭ germanoj, germanoj kontraŭ litovoj, poloj kontraŭ rusoj, rusoj kontraŭ germanoj, kaj tiel plu – kaj ĉiuj aliaj gentoj kontraŭ judoj.

La judoj estis ne nur la nekristanaj “eksteruloj”, kiuj portis strangajn vestojn kaj okazigis siajn diservojn en mortinta lingvo kaj parolis inter si strangan, senprestiĝan miksaĵon de la germana kaj hebrea lingvoj. Multe pli grave, ili estis ofte rigardataj kiel “la murdintoj de Jesuo” kaj do punendaj. Se la rikolto estis malbona aŭ se pesto amase

mortigis, do oni kulpigu la judojn kaj, laŭ la cirkonstancoj, buĉu ilin kaj forbruligu ilian sinagogon.

Unu el la rezultoj de tia daŭra fitrakrado estis, ke la judoj mem, pro jarcentoj de malbonaj spertoj, estis tre ofte ksenofobiaj – ili malamis la homojn, kiuj persekutis ilin, ili starigis barilojn inter si kaj la malamika medio. Estiĝis speco de juda patriotismo, kiu ekzemple preskaŭ malpermesis intergedziĝon de judo kun nejudo. Por tiuj homoj la sekureco de la juda komunumo estis la plej supera zorgo.

Sed estis aliaj judoj, kiuj vidis la sekurecon de sia popolo ne en tiu ksenofobia fermiteco, sed en evoluigo de internaciismo. Ili opiniis, ke ju pli la homoj ĝenerale pensos kaj agos laŭ sennacia aŭ internacia maniero, des pli la situacio de la judoj pliboniĝos.

La gepatroj de LLZ spegulis tiun disopinion inter la judoj. Rozalja, la patrino, estis laŭdire molkora, milda, pia persono, sed ĝisosta judino, tre religiema, kiu kultivis en la knabo Ludoviko tiun patriotismon, pri kiu mi parolis. Ludoviko neniam forgesu, ke li estas hebreo kaj ke lia pralojaleco estu al la hebrea gento kaj ĝia religio.

Marko Zamenhof, la patro, estis probable multe pli inteligenta ol sia edzino Rozalja kaj li estis ateisto, do ne gravis por li la religiaj kredoj de la judoj. Marko estis reprezentanto de la internaciismo menciita, li estis eĉ apoganto de la ideo ke la judoj asimiliĝu kun la ĉirkaŭaj popoloj. Marko laboris por la cara registaro kiel cenzuristo de juda literaturo, kaj li konis diversajn lingvojn. Por tia homo, kia Marko, la homaro multe gajnus per forigo de religiaj kredoj aŭ almenaŭ de la emfazo pri tio, kio malsamas en la diversaj religiaj kredoj.

Kiel la knabo Ludoviko reagu al la fortaj disopinioj de la gepatroj? Vivolonge li estis tirata tien kaj reen: li ja estis patriota judo, kaj la suferoj de la propraj samgentanoj tre afliktis lin. Aliflanke li estis, eĉ pli ol la patro, elstara ekzemplo de homo pensanta internaciisme.

Patrioto: eble estas surprizo ekscii, ke Zamenhof estis la unua, kiu ellaboris gramatikon de la jida lingvo. Li mem ne havis altan opinion pri la jida, kiun li kutime nomis ĵargono, sed lia sinteno estis ke, ĉar ĝi estas la kvazaŭa translandlima lingvo de la judoj, oni strebu plinobligi, pli sistemigi ĝin. Kaj Ludoviko vidis tiujn terurajn brutalaĵojn, kiujn ni nomas pogromoj. Li aliĝis al la cionisma movado, kiu celis krei novan hejmlandon por judoj, kie ili vivu sen la konstanta danĝero alfrontata en Eŭropo. En siaj fruaj jaroj Zamenhof estis eĉ tre konata aktivulo en cionismaj rondoj. Sendube lia patrino Rozalja aprobis tion, eĉ se ŝi ne kapablis kompreni la politikon de la mondo.

Sed LLZ ne povis eterne resti en tiu mensa kadro: li estis kaj ĉiam estos homo kun internacia vidpunkto. La lingvo, kiun li elpensis, estis tute alia ol la jida, kaj celis tute

alian lernontaron: li esperis, ke ĝi iĝos la lingvo de internacia komunikado. Kvankam li aprobis la celojn de cionismo, se ili restos nur sindefendaj, LLZ turnos sian dorson al la cionisma movado. Li juĝis ĉian naciismon malbona kaj ĝuste aŭguris, ke eĉ la plej subpremata popolo povus, se estus turniĝo de la sorto, iĝi subprema popolo. Ne per mallarĝa patriotismo la judoj trovos sekurecon, sed per sia unika kontribuo al internaciismo.

Krome, Zamenhof vidis en sia lingvo nur la unuan paŝon al pli harmonia, paca, kaj justa mondo. Li mem ligis Esperanton al filozofio, kiun li nomis hilelismo. Kaj kiu estis tiu Hilel? Li estis antikva juda pensulo el periodo iom antaŭ Jesuo. Do eĉ la filozofio de internaciismo portas, en la menso de LLZ, judan nomon. Alivorte eĉ lia internaciismo havis judajn radikojn.

Kaj kiel la esperantistoj reagis al hilelismo? Negative. Baldaŭ la ĉefaj figuroj en la Esperanto-movado estis francaj intelektuloj, grandparte ateistoj. Ili agnoskis la lingvajn meritojn de Zamenhof, sed aliflanke ili rigardis lin “stranga juda mistikulo”, kaj ili deklaris, ke Esperanto estas ligita al nenia “interna ideo”, ke ĝi estas nura kaj pura lingvo. Zamenhof vidis sin devigita fojon post fojo certigi, ke liaj broŝuroj pri hilelismo aperos anonime, ke li ne kompromitu Esperanton per sia propra filozofio.

Sed imagu la mensan konflikton de homo, kiu kreis lingvon sed ne rajtis propranome uzi tiun lingvon por esprimi siajn plej karajn pensojn. Tamen, povas esti, ke finfine la insisto, ke Esperanto estas pli ol nura lingvo, montriĝos ĝusta. Eble LLZ triumfos super siaj akademiaj oponuloj.

Se ni insistas ke Esperanto estas nenio krom lingvo kiu ebligu internacian interkomunikadon, ni devas cedi ke ĝi jam fiaskis. La angla ekde kelkaj jardekoj jam transprenis la rolon, kiun la fruaj esperantistoj esperis por sia lingvo. Ni scias, ke la angla estas ne aparte taŭga kiel internacia lingvo – ni pensu pri ĝia senespere malbona ortografio kaj multaj neregulaĵoj – sed la potenco de la angla ŝajnas aktuale forbuldozi ĉian reziston. Kial? Ĉar ankoraŭ regas malnovaj pensŝablonoj: la plej forta trudas sian volon al la ceteraj kaj ili pli-malpli akceptas tiun volon.

Sed se iam la mondo estos sufiĉe matura por akcepti moralajn argumentojn por egaleco, kunlaborado ktp., la supereco de Esperanto, ne nur sur lingva nivelo, sed ankaŭ kiel vere internacia ilo, devus esti klara. Se oni komprenos ke Esperanto portas en si la ideon, ke ĉiuj homoj estas egalrajtaj, ke la komuna lingvo de la homaro devas ne esti la lingvo de la plej forta parto, ke Esperanto estas la lingva elemento de la strebado krei pli bonan mondon – do Esperanto atingos sian celon. La “stranga juda mistikulo” montriĝos pli realisma ol liaj kritikintoj.

Fama ido de Aŭstralio: Ŝtormido

Katja Steele

La sud-aŭstralia filmindustrio celebras en 2012 kvardek jarojn de sia ekzisto. Okaze de la jubileo aperis kelkaj artikoloj, okazis specialaj projekciadoj de malnovaj filmoj kaj en la galerio de la Ŝtata Biblioteko en Adelajdo estis de oktobro ĝis decembro ekspozicio. Kial tio rilatas al Esperanto? Ĉar unu el la klasikaĵoj de la sudaŭstralia kaj samtempe tutaŭstralia kinematografio eniris ankaŭ la Esperanto-kulturon. Temas pri Storm Boy, esperante Ŝtormido.

La filmo, produktita en 1976, ricevis sian Esperanto-baptiĝon dum la Universala Kongreso (UK) de UEA en Adelajdo en 1997. Estis Margaret Furness kiu venis kun ideo doni al profesie produktita ludfilmo esperantajn subtitolojn kaj kiu mem organizis kaj pagis la koncernajn laborojn kaj kostojn.

Margaret: “Grava parto de UK estas prezentado de kulturo de la gastiglando al la partoprenantoj. En Aŭstralio ni fieras pri nia kinoarto, do mi decidis aranĝi por la Adelajda UK tradukadon kaj subtitoladon de aŭstralia filmo. Tiel ni kreos kongresan memoraĵon, kiu ne forvaporiĝos.

Kiun filmon elekti? Prefere ĝi havu malmulte da parolado, por ke oni ne devu tro rapide legi la subtekstojn. Ĝi estu prefere el Sud-Aŭstralio. Prefere filmo, kiu montras nian pejzaĝon kaj vivaĵojn. Prefere taŭga por infanoj, ĉar estis malmultaj porinfanaj filmoj en Esperanto. Simpla solvo: Ŝtormido, iom malnova sed tre ŝatata filmo, kun kvalito internacie aprezata.

Trevor Steele jam malsingardeme proponis fari “kongresan laboron, kiun neniu alia deziras fari”, do mi kaptis lin por la tasko. Ankaŭ mi devis iomete labori por kontroli, ĉu estas sufiĉe da tempo por legi la vortojn kaj ĉu lia traduko estas trafa.

La prezidanto de la loka kongresa komitato opiniis ke la necesa monsumo estus pli taŭge uzata por alia aspekto de la kongreso, kaj li pravis; je la fino, nia UK malgajnis monon. Sed mi insistis pri la pretigo de Ŝtormido, kaj ankaŭ mi pravis.

Pro kopirajtaj kialoj ni ne povis vendi ekzemplerojn de la filmo, nur fari manplenon da kopioj. Tiujn (nu, du manplenojn) mi disdonis al ĉefaj E-bibliotekoj kaj grandaj kluboj tra la mondo. Ĉu iu prunteprenas ilin por spekti, aŭ ĉu ili nur ripozas en malluma ŝranko, mi ne scias. Sed mi esperas, ke oni daŭre ĝuadas ĝian spektadon.”

Trevor: ”Prepare al la UK en Adelajdo Margaret Furness decidis doni esperantan subteksto al taŭga aŭstralidevena filmo. Ŝi elektis Storm Boy, kiun mi esperantigis kiel Ŝtormido. La faktan enmeton de la subteksto en Esperanto faris SBS (Special Broadcasting Services), aŭstralia elsenda servo kaj televida kanalo, kiu ofte prezentas neanglalingvajn filmojn kun subteksto en la angla.

Mi havis la taskon provizi la esperantan tekston, kaj tio estis interesa sperto. Ŝtormido prezentas pripensindan problemon pri homaj rilatoj. Viro, kiu suferis pro perfido de

la amatino (eble edzino), retiriĝis al fora senhoma rezervejo nomata Coorong, kie li vivas de fiŝkaptado. Li volas fortenadi sian filon de kontakto kun la ekstera mondo. La simpatia knabo amas sian patron sed ankaŭ volas scii, kia estas tiu fora mondo. Manke de homa kontakto la knabo amikiĝas kun pelikanoj, kiujn li transprenas kiel idetojn kaj ame flegas ĝis plenkresko. Tiam du el la tri pelikanoj forflugas laŭ siaj instinktoj de sovaĝaj birdoj, sed unu (Sinjoro Persival) restas. Venas ankaŭ homo en tiun junan vivon: aborigeno forpelita el la propra grupo amikiĝas kun la knabo.

Dekomence estas klare ke la inteligenta knabo tamen foriros de la forkaŝejo kaj edukiĝos en la vasta mondo. Kiel tio eblas, estas laŭ mi nekredinda evoluo (dank' al la pelikano!), sed evidente la sentimentala fino tuŝas la koron de multaj homoj.

Bonŝance por la tradukanto multaj scenoj en la filmo (kiu montras belajn pejzaĝojn kaj birdojn) apenaŭ havas dialogon, kaj facilas redoni la malmultajn vortojn. Sed kiam estas dialogo, en kiu parolas pli ol unu homo samtempe, oni devas draste precizigi kaj redoni nur la kernon de la frazoj. Oni laŭeble skribu vortojn, kiuj povus veni tra la lipoj de la parolantoj – malfacila tasko! Mallongaj frazoj necesas, ĉar en kelkaj kazoj la scenoj rapide ŝanĝiĝas, kaj oni havas sufiĉe da tempo por doni nur la esencon. Mi estis bonŝanca, ke mi havis antaŭ mi la originalan anglan tekston en skriba formo, ĉar ne ĉiam mi komprenis ĝian parolatan formon.

Mi profitis de tiu laboro ĉefe en Litovio (1998 - 2001), kie mi regule montris la filmon fine de mia dua unumonata Esperanto-kurso (eble dek fojojn mi povis ĝin uzi). Tio necesigis ĉiutage dum la kurso doni, krom la ceteraj materialoj, kelkajn novajn vortojn el la filmo, ekzerci frazstrukturojn, uzi ilin en krucvortenigmoj, partneraj taskoj, kvizoj, ktp. Kiam fine la lernantoj spektis la filmon, kiun ili preskaŭ certe ne komprenus en la angla, videblis ke ili kun plezuro sekvas la esperantan version. Kaj ili spertis ion pri la fora kontinento Aŭstralio."

Fine kelkaj aldonaj informoj: la filmo estis farita surbaze de porinfana libro de Colin Thiele. La knabon ludis Greg Rowe, David Gulpilil estis lia amiko Fingerbone Bill. La direktoro estis Henri Safran kaj la belegan fotadon faris David Kynoch.

La filmo estis populara kaj en Aŭstralio kaj en Britio kaj ricevis premion "La plej bona porinfana filmo" en la Moskva Film-festivalo en 1977 kaj la premion "La plej bona filmo" de la Aŭstralia Filma Instituto en 1977. Storm Boy estis sukcesa ankaŭ finance, enspezante nur en Aŭstralio $2 645 000.

Pelikano Sinjoro Percival mortis en la bestĝardeno de Adelajdo en 2009, tridek tri-jara.



Raporto de la Aŭstralia Esperanta Kongreso en Brisbano, 2012 kaj Kelkaj Personaj Travivaĵoj

Kam Lee

La Aŭstralia Esperanta Kongreso 2012 okazis en Brisbano ekde la 28-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro.

La unua tago estis neformala afero. Unue okazis renkontiĝo de antaŭkonataj homoj kaj amikoj kaj nekonataj homoj ĉe la Hotelo George Williams dum la malfrua postmeztago. Komuna vespermanĝo okazis. Poste en subtera etaĝa ĉambro de la hotelo okazis kelkaj agadoj, kiuj konsistis el interesa ludo, filmoj, ĝenerala konversacio, diskuto kaj aliaj. Observanto de la kongreso estis raportisto de “Smith Ĵurnalo” kaj li verkos artikolon pri artefaritaj lingvoj.

Ĝoja afero estis la ludo “Jes aŭ Ne”. La ludejo estas spaco dividita per rubando en du duonojn. Ne estas teamoj kaj kiom ajn ludantoj rajtas partopreni.

La dekstra duono estas la “jes”-a loko kaj la maldekstra duono estas la “ne”-a loko. La arbitracianto faras demandon, kaj poste la ludantoj respondis per “jes” aŭ “ne”. Se ludantoj respondas per “jes”, ili iras al la “jes”-a aŭ dekstra loko. Se ludantoj respondas per “ne”, ili iras al la “ne”-a aŭ maldekstra loko.

Unue okazis simpla demando, “Ĉu vi estas viro?”. La viroj iris al la “jes”-a loko kaj la virino al la “ne”-a loko. Sekvis aliaj simplaj demandoj kaj la ludantoj respondis per irado al la ĝusta loko. Poste venis la pli debatindaj demandoj, “Ĉu vi opinias ke Julia Gillard estas bona ĉefministro?” Kelkaj

Bildo 1: Kongresanoj dum vespermanĝo ĉe la Hotelo George Williams, Brisbano

Fig 1: Congress participants at tea at the Hotel George Williams, Brisbane



opiniis jes, sed ili staris proksime al la jes/ne limo. Ili ne tre feliĉas ke Kevin Rudd estis detronita de ŝi.

Alia interesa demando estas “ĉu samseksa geedziĝo estu leĝe akceptebla?”. Ludantoj staris en diversaj partoj de la ludejo. Konklude, la ludo ne havas gajnantojn aŭ perdantojn kaj estas bona okazo por plibonigi aŭskultajn kapablojn.

Prezentita estis la informfilmo “The Universal Language” verkita de Sam Green. La filmo daŭris 30 minutojn kaj temis pri historio de Esperanto, la nuna situacio kaj celoj de la lingvo, kaj komentoj de kelkaj Esperantistoj, kiuj inkluzivis Humphrey Tonkin. Certe estis perspektive pensemiga filmo.

Sekvis la filmo “Mia Unua Kiso” de Nicole Else. Multaj el la aktoroj en la filmo estis bonkonataj Esperantistoj de Sidnejo.

Sabatmatene ĉe Griffith-Universitato, okazis la formala kongresa malfermado, deklarita de Dr Margarita Pavlova, kiu instruas en la fako de edukado. Margarita bonvenigis la kongresanojn al la nacia evento.

Margarita informiĝis pri Esperanto dum studado en Moskvo per gepatra amiko, kiu instruis Esperanton kaj poste iĝis ŝia amiko. Ŝi interesiĝis pri la internacia lingvo kaj poste ŝi partoprenis en scienca Esperanto-klubo kiu organizis sciencajn konferencojn tri fojojn jare. La konferencoj konsistis el du aŭ tri sinsekvaj vesperoj. Esploraj raportoj estis prezentitaj kaj ŝia prelego estis pri kompara edukado. Memorinda evento estis prezento de ŝia science prelego dum la Scienca Esperanta Kongreso en Pekino. Ŝia vizito okazis unu jaron post la tiea afero de Tiananmen-Placo.

Dum siaj fruaj jaroj en Aŭstralio, ŝi renkontis Esperantistojn en Melburno



Bildo 2: Raportisto de “Smith Journal” (maldekstre) neformale konversacias kun Sandra Connors (dekstre).

Fig 2: *Reporter for “Smith Journal” (left) talks casually with Sandra Connors (right).*

Bildo 3: Tepaŭzo dum la unua vespero de la kongreso ĉe la subetaĝa ĉambro de Hotelo George Williams. Sur la muro estas kopio de Esperanta informpaĝo, kiu estis montrita en la Migra Muzeo en Adelajdo lastatempe.

Fig 3: Tea break during the first evening of the congress in the basement room of the George Williams Hotel. On the wall is a copy of an Esperanto information page, which was recently displayed in the Migrant Museum in Adelaide.



kaj ŝi kelkfoje partoprenis en Esperantaj agadoj.

Diskuto pri Esperanto-renkontiĝo en aliaj landoj estis gvidita de Hazel Green kiu montris Powerpoint-dokumenton kun ekzemploj de alilandaj aranĝoj, kaj de spertoj en Esperantujo.

Ekzemploj de menciitaj internaciaj Esperantaj aranĝoj estas Universalaj Kongresoj, Internacia Junulara Kongreso de TEJO, ILEI-konferenco, SAT-kongreso, konferenco por diversaj fakoj (fervojistoj, kristanoj, blinduloj), pedagogiaj seminarioj de ILEI, de edukado.net, kaj landaj kongresoj kaj aliaj. Kiel parto de tiu sesio, Sandor montris fotojn el la UK en Hanojo, kaj Dmitri montris filmon la sekvan tagon. Oni povas konkludi ke multaj viglaj Esperantaj agadoj okazis en diversaj partoj de la mondo.

Sandor gvidis diskuton pri la estonteco de Esperanto en Aŭstralio



Bildo 4: Margarita (dekstre) parolas pri siaj travivaĵoj kun Esperanto dum la malferma ceremonio.

Fig 4: Margarita (right) talks about her experiences with Esperanto during the opening ceremony.



Bildo 5 (dekstre): Alexandra (maldekstre) kaj Kam (dekstre) ludas la violonojn.

Fig 5 (right): Alexandra (left) and Kam (right) play the violin.



Bildo 6: Amika konversacio dum sabatmatena tepaŭzo

Fig 6: Friendly conversation during Saturday morning tea break

kaj menciis la gravecon kaj potencon de interretaj agadoj.

Vespere okazis libertempo kaj okazo por vidi la piroteknikaĵojn de la Brisbana Festivalo. Mi informiĝis ke komenco de la piroteknaĵoj estos je la sepa. Mi unue opiniis ke la komenchoro estas tro frua kaj mi scivolis ĉu fakte estis eraro en la festivala programo. Ĉiuj ĉefuboj de la orientaj ŝtataj de Aŭstralio estas en la sama horazono, sed mi trovis ke Brisbano estas pli orienta ol Sidnejo kaj multe pli orienta ol Melburno kaj Hobarto.

Interesa komparo estas ke la sunsubiĝa horo hodiaŭ en Brisbano, Sidnejo, Melburno kaj Hobarto estas 5.47 ptm, 5.56 ptm, 6.23 ptm kaj 6.15 ptm respektive kaj la mara krepuskfinhoro estas 6.38 ptm, 6.51 ptm, 7.20 ptm kaj 7.17 ptm respektive. La mara krepuskfinhoro estas la horo kiam la nokto estas sufiĉe malluma tial ke la steloj estas videblaj por navigado.

Mi iris kun aliaj al la Terpunkto de Kangaruo kaj la komenchoro estis sufiĉe malluma. La piroteknaĵoj estis laŭnĉitaj el barĝoj sur la Brisbana Rivero, el ĉielskrapantoj kaj pontoj. La atmosfero estis subtenita de muziko el laŭtparoliloj. La spektaklo estis sendube admirebla kaj memorinda evento.

Dimanĉmatene, 15 kongresanoj komencis piediri el Griffith-Universitato al Monto Gravatt. Ni feliĉe piediris laŭ la senbituma serpenta 1-kilometra vojo kaj ĝuis la naturan trankvilan medion, kiu estas miksaĵo de arbusto kaj arbaro. Kelkfoje ĉe la krutaj lokoj, ni paŭzis kaj la grupo estis fotita. La vetero estis tutnuba, senventa kaj mezvarma.

Kvardek minutojn poste, ni atingis la supron de Monto Gravatt, kiu estas 194 metrojn alta. Kontraste kun la sovaĝa arbara piedvojo, la supro estis tre orda kaj manikurita per granda gazono kaj malgranda florĝardeno. Ni estis iomete fizike elĉerpitaj kaj ni celebris per kafumo kaj babilado je la montpinta kafejo dum tridek minutoj. Oni povas rigardi la urbocentron de Brisbano, kiu estas proksimuma je dek kilometroj nordokcidente.

Dum la revenado, mi rimarkis en nia grupo homon, kiu tre similas al unu el la arbitriantoj en la SBS-televidprogramo “Leteroj kaj Nombroj”.

Bildo 7: Piroteknikaĵoj estas launĉitaj de sur Storey-Ponto, dum la Brisbana Festivalo. Laŭtaj huraoj de la homamasoj estas auditaj.

Fig 7: Fireworks are launched from Storey Bridge, during the Brisbane Festival. Loud cheers from the crowds are heard.



Tamen, kiom estas la probableco ke li estas la sama homo?

Mi unue demandis lin en neformala maniero ĉu li scias pri la homoj en la televidprogramo “Literoj kaj Nombroj”. Li rekte respondis jes.

Mi demandis al li ĉu li iamfoje renkontis la viron, kiu arbitraciis la respondojn pri la literoj, kaj senhezite li respondis jes. Mi demandis al li kiam li renkontis ĉi tiun personon kaj li memfide respondis, ke li estas ĉi tiu persono! Mi estis tiom surprizita ke aliaj homoj eĉ scivolis kio okazis al mi! Poste aliaj ekaprecis ĉi tiun malkovron, ke televida famulo estas en nia grupo. Poste mi konversaciis kun David Astle pri aspektoj de la programo. Ni iomete ŝercis pri la “Full Monty”, kiu rezultas

Bildo 8: Ni paŭzis laŭ la piedvojo. En la fono estas tipa ekzemplero de la arbaro.

Fig 8: We had a rest along the track. In the background is an example of the forest.



Bildo 9: Piedirantoj trinkas kaj celebras ĉe la kafejo lokita je la supro de Monto Gravatt. Kio povas esti pli bona stimulilo por fini la ekskurson al la pinto ol rekompenco de trinko kaj babilado en la kafejo?!

Fig 9: Walkers drink and celebrate at the cafe located at the top of Mt Gravatt. What could be a better incentive for completing the journey to the summit than a drink and chatting at the cafe?



dum la scia konkurso post kiam oni faras vorton el la sep prezentitaj leteroj!

Poste ĉe Griffith-Universitato okazis medita periodo, kiu konsistis el muziko, legado de tekstoj de diversaj religioj kaj filozofoj, poemoj, citaĵoj kaj aliaj en la esperanta aŭ angla lingvo.

La postmeztagaj agadoj konsistis el prelego de Penny Vos, teatraĵeto de Bob Felby kaj Kam, prelego de Sandor Horvath kaj prelego de Jim Radford, kiu parolis pri la nova mondo de Esperanto kaj la interreto.

La teatraĵeto temis pri parodia intervjuo de Sherlock Holmes kaj aŭkcio de lia violino. La esperanta teksto de la intervjuo estas traduko de originala verko en la angla.

Sherlock estas komisiita kiel la ĉefdetektivo por la solvo de la Granda Trajnrabado. Je la komenco de la intervjuo, li prave deklaras ke la publika nocio de Granda Trajnrabado fakte estas granda miskompreno, ĉar la daŭro de la esplorado de la krimo ne rilatas al la ŝtelo de la trajno, sed al la ŝtelo de la trajna enhavaĵo. Li ellaboras ke de post 1946 neniu trajno estis perdita kaj fakte grandegaj vaportrajnoj malfacile perdiĝas. Li mencias, ke dum 1946 okazis granda neĝo kaj kelkaj malgrandaj trajnoj estis mislokitaj.

Dum la intervjuo, la intervjuisto faras multajn demandojn, kiujn Sherlock miskomprenas kaj li




Bildo 10: Linda Danzer prelegas dum la diservo.

Fig 10: Linda Danzer presents a talk during the religious service.



Bildo 11(meze kaj dekstre): Sandor parolas pri siaj mirindaj internaciaj kongresaj travivaĵoj. Koincide dum li matene biciklis al la kongresejo du truoj en liaj pneŭmatikoj okazis, sed tiaj estas nesignifaj obstakloj!

Fig 11(middle and right): Sandor talks about his wonderful international congress experiences. Coincidentally two tyre punctures occurred while cycling to the congress during the morning, but such are minor obstacles!



Bildo 12: Penny Vos prelegas pri lastatempaj agadoj de Mondeto kaj rilataj propraj spertoj.

Fig 12: Penny Vos talks about the recent activities of Mondeto and relevant personal experiences.

respondas per fuŝaj sed ankaŭ koincide lertaj komentoj.

Dum la mezo de la intervjuo okazas aŭkcio por la violono de Sherlock. Sherlock tute forgesas sian violonan ludkapablon kaj do li deziras vendi sian muzikilon. La proponantoj por la violono estas homoj el la aŭdantaro kiuj antaŭ la teatraĵo estis petitaj partopreni. Decidite de kelkaj kuraĝaj partoprenantoj, la violono de Sherlock estas vendita por $40.00 malgraŭ la penoj de la aŭkcisto.

Post la eskcito de la aŭkcio okazas la redaŭro de la intervjuo kaj pli da obskuraj respondoj. Je la fino,



Bildo 13: Bob (maldekstre) kun mandolino kaj Kam (dekstre) kun violono ludas la Esperantan himnon por fikcia Esperanta televidprograma intervjuo de Sherlock Holmes.

Fig 13: Bob (left) with mandolin and Kam (right) with violin play the Esperanto hymn for a fictitious Esperanto television program interview with Sherlock Holmes.

Bildo 14: Grupo de partoprenantoj estas fotita apud la kongresa prelegejo post la lasta semajnfina programa evento ĉe Griffith-Universitato.

Fig 14: The group of participants photographed beside the congress auditorium, after the final weekend programme event at Griffith University.



Sherlock hazarde konfesas al kaŝita nedeklarita sumo de mono rilate al solvita krimo. Por eviti klarigon de la embarasa afero, li neantaŭvidite staras kaj forpiediras.

Tre interesa kongresa prelego estas la prezento de Jim Radford, kiu komerce faras interretejojn en Aŭstralio. Li menciis kaj priskribis la Esperantajn retejojn “Lernu.net” kaj “Vikipedio”. Unu el liaj preferataj Esperantaj retejoj estas la esperanta muzika interretejo, Vinilkosmo.com, kiu estas interreta butiko kaj vendas Esperantajn kantajn kaj muzikajn KD-ojn.

Menciinda estas lia diskuto de la tradukretejo “Google Translate” kie oni povas meti anglan tekston en unu parto de la retejo, kaj konsekvence okazas esperanta traduko. Okazis praktika demonstro per komputilo ligita al la interreto. Sur la muro per cifereca kinoskopo estis bildo de la retejo de Google Translate. La ŝanĝo el unu lingvo al alia ne estis perfekta, sed granda parto de la traduko estas tre bona.

Jim avizis, ke informo dissendita per la interreto nuntempe forte influas la ĝeneralan publikon, kaj do la Esperanta movado devas adapti siajn reklamadajn strategiojn al tia monda moderna teknologio.

Li prezentis specifan ekzemplon, ke uzantoj de porteblaj telefonoj kun Interreto-aliro rapide kreskas, kaj do la Esperanta interetejo nun devas esti modifitaj por esti facile videbla de tiaj homoj.

Alia interesa malkovro estis ke Jim trovis la reputacian rangon de la AEA-interetejo. Laŭ la Alexa trafik-rango, la retejo de AEA estas en la plej bonaj 5 000 000 retejoj en la mondo. (La retejo aea.esperanto.org.au dum frua decembro, 2012 havis la trafikrangon de 3,808,541 kaj ĝi estis rekte ligita al 57 interreterjoj.) Tamen,

Bildo 15: Lunĉpaŭzo post la ĝenerala jarkunsido de AEA ĉe la biblioteka kafejo

Fig 15: Lunch break after the AEA annual general meeting at the library cafe



la loka rango estas relative ne tiom populara.

La Alexa ranglisto estas listo de la plej vizititaj retejoj kaj estas registrita de Alexa Internet Inc, fondita en 1996. La nomo Alex alludas al la Biblioteko de Alexandria. Dum 1999, la kompanio Amazon.com aĉetis la kompanion Alexa kaj aliajn posedaĵojn kontraŭ US $250 milionoj.

Lundmatene okazis la ĝenerala jarkunsido de AEA ĉe la Ŝtata Biblioteko de Kvinslando. La Prezidantaj kaj direktoraj raportoj estis laŭtlegitaj. Bedaŭrinde pro manko de tempo, ne okazis disukto pri la raportoj aŭ eĉ pri aliaj aferoj, malgraŭ ke la kunsido etendiĝis.

Postmeztage okazis neformala kunsido kun la nova estraro kaj membroj de AEA. Okazis iom da diskuto pri proponoj senditaj de membroj de AEA. Kelkaj el la diskutitaj aferoj estas (1) ĉu AEA devus esti kompanio aŭ asocio (2) somerkursaro en januaro (3) daŭro de la presado de ESK kaj aliaj aferoj.

Konklude, la kongreso estis sukcesa afero kaj sendube okazis kelkaj memorindaj eventoj. Mi dankas Crystal Hill pro la uzo de ŝiaj fotaĵoj: 2, 3, 4, 5, 6, 10, 11, 12 kaj 13.

Bildo 16: Tri kongresanoj staras antaŭ skulptaĵo nomita "Proksimiĝante al Ekvilibro" (1985) verkita de Anthony Prior (1951-1991). La metala verko staras prokismume antaŭ la Ŝtata Biblioteko de Kvinslando, Brisbano.

Fig 16: Three congress participants standing in front of the sculpture "Approaching Equilibrium" (1985) by Anthony Prior (1951-1991). The metal work is located near the front of the State Library of Queensland, Brisbane.



Stelsemantoj el la ora nordo

Katja Steele

Ĉi-jare ni spertas la 125-an jaron de la Internacia Lingvo. En tiu tempodaŭro estis eble unu jardeko, kiam oni vere povis imagi ke Esperanto iĝos LA tutmonda lingvo. Temas pri la tempo antaŭ la Dua Mondmilito, kiam pro la laboro de Andreo Cseh kaj liaj disĉiploj Esperanto floris precipe en Eŭropo.

Andreo Cseh famiĝis pro sia instrumetodo, laŭ kiu oni de la komenco parolas nur Esperante kaj en agrabla maniero, ne uzante lernolibron, rapide alproprigas al si la parolatan lingvon. La metodo de pastro Cseh tiom furoris en lia hejmlando Rumanio kaj poste en aliaj landoj de Eŭropo ke li akiris episkopan forpermeson kaj dediĉis sin nur al E-instruado. En 1930 li establis en Hago-Instituton por organizi E-instruadon kaj trejni Cseh-instruistojn. Antaŭ la Dua Mondmilito estis registritaj 497 de ili, inter kiuj Lidia Zamenhof, Julio Baghy, Margarete Saxl kaj Tiberio Morariu el Rumanujo. La libro de Katalin Kovats omaĝas unuavice lin.

En 1928 Morariu (1901-1987) estis invitita al Svedio por trimonata prelegserio pri Rumanio kaj gvidado de E-kursoj. Liaj unuaj kursoj kun partopreno de cento da kursanoj daŭris ses semajnojn. Ankoraŭ dum la kursa periodo li prelegis al 500 lernejanoj pri Rumanio (tradukite en Esperanton), al alia plurcento da homoj alia prelego, plia por 100 infanoj ktp. Veturo de urbo al urbo, prelegoj, kursoj, ekzamenoj, bankedoj - kaj sukceso. La svedaj organizantoj invitis Morariu plilongigi lian restadon. Li restis plian jaron, tri jarojn kaj fine li travivis la reston de sia vivo en la nordo. Tiu vivo estis plenplena de poresperanta agado. Jen ekzemplo el 1936: dum unu 5-monata serio li vojaĝis 8139 kilometrojn, prelegis antaŭ 1500-membra publiko, gvidis kursojn por 200 komencantoj kaj 100 progresantoj, vendis librojn je la valoro de 500 kronoj, pri liaj kursoj aperis en la regionaj gazetoj artikoloj en 65 kolonmetra longo.

La movado en Svedio estis plene floranta. Korespondan kurson de la Sveda E-Federacio en 1933 mendis (kaj pagis) 27 000 lernantoj, en 1938 jam estis 40 000 homoj. Ĝis la fino de 1932 en Svedujo aperis 27 lernolibroj en 44 eldonoj kun ĉ. 170 000 ekzempleroj, vortaroj en 55 000 ekz. ..

Morariu en 1931 edziĝis kun sveda Lizzie Andersson, kiu mem instruis kaj kun kiu li multe vojaĝis ankaŭ alilanden. Lian laboron eĉ la Dua Mondmilito ne povis haltigi. La svedaj movad-gvidantoj decidis funkciigi kaj pagi Esperantan ombudsman-sindikon: Morariu. La taskoj estis ege multaj: prelegi, ekzameni, konsili, propagandi, varbi, verki artikolojn, vendi librojn...tra la tuta lando.

Katalin Kovats en sia verko bone pridokumentas unu tutan

neordinaran Esperanto-vivon. Ni miras, eĉ miregas, pri la grandaj ciferoj kaj pri nia ĝisnuna nescio pri tiom grandiozaj agoj kaj personecoj de nia movado, ĉar ne nur Morariu ekvivas antaŭ niaj animaj okuloj, sed ankaŭ pluraj liaj samtempuloj kaj kunlaborantoj. Dum unuflanke ni ricevas enciklopediajn konojn, per citado de leteroj, artikoloj, radiointervjuo kaj per uzo de multaj fotoj, nia kleriĝo estas agrable "homdimensia".

La legintoj de la Stelsemantoj certe multon lernos pri "nia" pasinto kaj tio eble iom modifos iliajn juĝojn pri la nuna stato de la Esperanto-movado. Li aŭ ŝi eble inspiriĝos por la estonta agado, eble ĉerpos energion el la ekzemplaj faroj de aliaj.

La libro estas ne nur interesa el la enhava vidpunkto, ĝi estas ankaŭ estetike tre plaĉa. Pluraj aŭstralianoj konas jam la elstarajn instru-kapablojn de Katalin Kovats, mi certigas, ke ankaŭ ŝia skribita verko indas je konatiĝo. Kaj mia fina aldono: Mi dezirus ke ankaŭ la aŭstraliaj E-pioniroj estu iam simile memorataj.

Stelsemantoj en la ora nordo. Tiberio Morariu kaj liaj samtempuloj. Eldonis: E-duKati, Den Haag, 2011, 159 paĝoj. Ĉe UEA mendeblas kontraŭ 18 eŭroj + la sendokostoj; Se iu deziras havi la libron, sed ne povas aranĝi la mendon de eksterlando, bonvolu kontakti Katja Steele: katja.steele@gmail.com.

Rejkjaviko atendas vin.

La 98-a Universala Kongreso de Esperanto okazos inter la 20-27-a de Julio 2013 en Islando. Kongreskotizo por aŭstralianoj kaj novzelandanoj ekde 1-a de Aprilo 2013 estas jene: (euroj)

1) Por individuaj membroj de UEA: 270

2) Por ne individual membro de UEA: 340

3)Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individual membro de UEA: 135

4) Kunulo/junulo/handikapulo, ne individual membro de UEA: 205

Ne forgesu re/-aliĝi al UEA.
Membreco kostas:

-al aŭstraliano 14 dolarojn, al novzelandano 18 dolarojn (kategorio Individua Membro kun Gvidlibro)
-al aŭstraliano 34 dolarojn, al novzelandano 44 dolarojn (kategorio Individua Membro kun Jarlibro kaj la revuo Esperanto rete (kaj ĝis inkluzive 29 jaroj membro en TEJO kun Kontakto)
-al aŭstraliano 85 dolarojn, al novzelandano 110 dolarojn (Individua Membro kiel la antaŭa kategorio plus la revuo Esperanto).

Por pliaj informoj kontaktu Katja Steele (AU)aŭ David Dewar (NZ). Reta aliĝilo haveblas ĉe: www.uea.org/kongresoj/uk_alighilo.php

Katja Steele

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Chris Krägeloh | President
chris.krageloh@gmail.com

Bradley McDonald | Vice-President
Bradley.m@woosh.co.nz

David Ryan | Treasurer
ryangomez@xtra.co.nz

Howard Gravatt | Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erinmcgifford@hotmail.com

Rouan Van Ryn| Committee Member
a.tkanek@gmail.com

Ivan Pivac | Committee Member
ivan@zabonne.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the

Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
www.oceana-esperanto.weebly.com
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President
prezidanto@esperanto.org.au

Kam Lee | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Indrani Beharry-Lall | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Heather Heldzingen | Dir. of Member Services
servoj@esperanto.org.au

Margaret Chaldecott | Dir. of Promotion
informado@esperanto.org.au

Gordon Coleman | Director of Education
edukado@esperanto.org.au

Max Wearing | Director of Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



